



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (ELI)

P.K. 39004, TEL AVIVO

N-ro 63 - JANUARO 1978

האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

חוברת 63 - ינואר 1978

העורך: אלכסנדר מנור




E N H A V O

E-to kiel fundamento por internacia kulturo-	1.
A. Manor	
L. Zamenhof ne estis monavida - A. Holzhaus	2.
Novjara mesaĝo - H. Tonkin	5.
Rajto de komunikado kaj Unesko	5.
Ce la akvo de Babilono - K. Ujejski (trad. I. Missiuro)	6.
Fondita sur roko - recenzo - A. Manor	7.
Kie donis Moseo la dek ordonojn? - H. Mašler	8.
Bibliaj enigmoj - Z. Dimant	9.
<u>JELI - angulo</u>	
Esperanto-hebrea vortareto	10.
<u>Turisma angulo</u>	
Jafo - J. Šemer	11.
En tombarejo - trad. J. Kohen-Cedek	12.
Lando Israelo - Š. Mizeruĥa	13.
Malfermita letero - Z. Dimant	14.
Krucvortenigmo - J. Šemer	15.
Rotario kaj esperanto	16.
El nia movado kaj agado	17.



Ornamis: Irit Klajner



— Parolantoj de lingvoj en la mondo.

ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO -LIGO
EN ISRAELO

Ĉefredaktoro:
Aleksander Manor
Vicredaktoro:

P.K. 39004, Tel Avivo
N-ro 63 - Januaro 1978

Josef Šemer

ESPERANTO KIEL FUNDAMENTO POR INTERNACIA KULTURO

La judoj de Bjalistoko estis ekstermitaj per la fajro de la homa kruela besteco. Sed la nomo de d-ro L. Zamenhof restis kiel simbolo de malnova Bjalistoko, simbolo tragika, sed eterna, de la granda kontribuaĵo de bjalistoka judo al la tuta homaro. Z. metis la bazon por la tuthomara kulturo, kies celo estas malgrandigi la dependecon de homo de sia biologia heredaĵo per nuligo de artefaritaj obstakloj, kiuj disigas la homojn. Ne oceanoj kaj montoj dividas ilin, sed nur egoismaj kontrastoj kaj kapricaj bariloj apartigas unuj de la aliaj. Por la hodiaŭa homaro ne restis multaj vojoj por elekti: La unua vojo kondukas al la plena ruino kaj la dua al progreso, solidareco kaj libereco.

Ĉiu nacio kreas memkompreneble sian nacian kulturon per siaj propraj fortoj. Sed la internacia tuthomara kulturo aŭ almenaŭ ĝia fundamento ne estas ebla sen la spirita kontribuaĵo de la judaj geniuloj: Spinoza, Ajnŝtein, Marks, Freud kaj Zamenhof.


Zamenhof mem konstatis, ke cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj valoran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo neŭtrala, internacia... Dank' al esperanto ĉiuj homoj sin reciproke komprenos kaj pli malpli frue la tuta mondo fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj, sed ekstere samlingvaj.

La homaro jam faris unu paŝon antaŭen por krei tiun ĉi kulturon. Kiam Esperanto venkos kaj estos uzata kiel internacia lingvo, kreiĝos tiu bazo por unu ĝenerala internacia kulturo. Ĉar nur dank' al E. komencis la homoj renkontiĝi la unuan fojon ne kiel angloj, rusoj, francoj ktp. sed kiel homoj sen naciaj baroj, kiel reprezentantoj de homa socio, kiu staras super ĉiu ŝtato kaj nacio.

Nur E. memorigas al ĉiu homo, ke li ne estas nur nacia, sed antaŭ ĉioli estas socia kreitaĵo. Pro tio nur la faktoro, kiu plifortigas la rektan socian kaj internacian interligon inter la homoj, servas kiel fundamento por internacia kulturo.

Aleksander Manor

(Mallongigo de prelego dum la zamenhofa vespero la 15-an de decembro 1977.)



L. ZAMENHOF NE ESTIS MONAVIDA

Pri tio ni scias el liaj leteroj k. dokumentoj

1. El la unua Esperanto-libro (26.7.1887). Zamenhof skribas: "Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi."

1.a. El poŝtkarto de 12/24 IX 1898 al A. Caetano Coutinho Zamenhof skribas: "Por traduki la Ekzercaron" en lingvon portugalan mi kun plezuro donas al Vi mian plenan permeson."

1.b. El letero de 9/21.5.1896 al Paul Nylén: Kontraŭ la fakto, ke Vi ĉerpis el mia "Ekzercaro" por Via lernolibro-ekzercaro, mi absolute nenion havas. Kun plezuro mi permesas al Vi preni el ĉiuj miaj verkoj tiom, kiom vi volas.

2. El poŝtkarto de 19(27).3.1903 (poŝtstampo) al René Deshayes: "Presigi la "Vojon" Vi havas plenan rajton kaj Vi tute ne bezonas mian permeson pro tio ĉi."

3. El letero de 20/V.1905 al generalo Sébert: "Kun granda danko mi ricevis Vian leteron kun la sumo de 376 rubloj, oferitaj por mi de nekonata amiko, por faciligi al mi mian venon al la kongreso. Sed kvankam mi tre alte ŝatas la bonan amikan intencon de la nekonata oferinto, mi tamen tre bedaŭras, ke mi ne povas akcepti la oferitan monon, kiun mi petas Vin redoni al la oferinto kune kun mia plej sincera kora danko. Mi tute ne kaŝas antaŭ Vi, ke mia veturo al la kongreso estas por mi efektive tre malfacila. Mi havas nenian kapitalon kaj mi vivas kun mia familio de mia ĉiutaga perlaborado; tial la kostoj de la vojaĝo kaj la preskaŭ trisemajna perdo de profesia perlaborado

estos por mi efektive sufiĉe peza; tamen ankoraŭ pli peza estus por mi la konscio, ke al unua granda festo de Esperanto mi veturas por fremda mono. Tial mi neniam povas akcepti la grandaniman aferon, kvankam mi estas tre danko al Vi, estimata Sinjoro, kaj ankaŭ al la nobla nekonata oferinto por Viaj amikaj intencoj."

4. El letero de 20.6.1905 al la firmo Hachette: "ofte diversaj personoj libervole proponadis al mi procentan pagon de siaj verkoj (ekzemple, antaŭ 2 jaroj proponis al mi Stead, St. Martin, Fried, Ahlberg kaj aliaj; poste de Beaufront (kiam li volis eldonadi "Bibliotekon de l' Espérantiste"; nun Fruictier por la Granda Vortaro k.t.p.); Sed kvankam mi ĉiam estas en tre premita financa situacio, kaj kvankam ili proponadis al mi la monon simple kiel ŝuldon de dankeco, postulante de mi nenian laborem kaj nenian publikan aprobacion aŭ respondecon, kaj kvankam mi havis plenan rajton akcepti la proponatan pagon, - mi tamen ĉiam rifuzadis."

5. El letero de 18.7.1905 al "Tre estimata Sinjoro!" Akceptu mian plejkoran kaj sinceran dankon por Via propono pagi al mi la koston de mia vojaĝo. Volu tamen pardoni al mi, ke mi tiun proponon ne povas akcepti. Mi tre alte ŝatas Vian bonan deziron, sed mi sentus min tre nebene, se mi vojaĝus ne por mia propra mono."

6. El letero de 18.7.1905 al Bourlet: "Al Sinjoro Bréton mi respondis hodiaŭ, ke por lia deziro pagi al mi la koston de vojaĝo mi lin kore dankas, sed ke akcepti tion ĉi mi ne povas, ĉar mi sentus min tre nebene, se mi vojaĝus ne por mia propra mono."

7. El poŝtkarto de 22.1.1906 (poŝtstampo) al E. Lawrence: "Por presi la kantojn, mi de mia flanko kompreneble donas al Vi plenan permeson."

8. 15.10.1906 Zamenhof estis en Bruselo kaj 17-23.10.1906 en Parizo, por en Bruselo kun Charles Lemaire kaj en Parizo kun Emile Javal diskuti demandon pri reformoj de Esperanto. La 23-an de Oktobro 1906 Lemaire france skribis al Javal: Zamenhof foriris. Mi estis korpemita, vidante foriri tiel perditan en la vasta mondo - tiun duon-Kriston. Li ne volis, ke mi provizu al li seĝon en la luksa trajno ĝis Berlino. Li foriris, en sia humila triaklasa kupeo kun bombonoj por sia eta filino kaj du broĉoj por si. Mi opinias, ke li donis al ni admirindan ekzemplon." ("La nica literatura revuo." N-ro 21, Januaro-Februaro 1959, p.83).

9. En la universala kongreso de Esperanto en Barcelono, Hispanio, 1909 D-ro Henri Dor diris, ke la genia elpensado de D-ro L. Zamenhof efektive donis pacon al la homaro forigante militojn kaj proponis al la kongreso klopodi, ke Zamenhof ricevu Nobel'an premion de paco. Zamenhof tre dankis por la propono de D-ro Dor, sed petis, ke la kongreso ne prezentu tiun proponon kaj ne enskribu ĝin en la protokolon ("Lingvo Internacia". N-ro 189. Sept. 1909, p.427).

10. El poŝtkarto 26.11.1909 al "Kara kolego"; "El la "Pro-verbaro esperanta" Vi povas preni por la vortaro kiom vi volas."

11. El letero de 31.7.1911 al generalo Sébert: "Pagon por mia vojaĝo mi kompreneble ne prenos; mi nur akceptas (konforme al la ĝisnunaj tradicioj de niaj kongresoj), ke en la kongresa urbo mem mi kaj mia edzino estos gastoj de la kongreso kaj ne pagos por nia loĝado kaj manĝado. Miaj filoj kaj filino kompreneble ne estos gastoj de la kongreso; por iliaj kongresaj kartoj, kiel ankaŭ por ilia loĝado, manĝado k.t.p. mi pagos mem."

12. El letero de 27.12.1912 al B.E.A.: "Preni ian pagon pro la frazoj, kiujn fraŭlino Fryer ĉerpis el mia Ekzerca-ro por sia lernolibro, mi absolute ne konsentas. Mi kore dankas la konsilantaron de Via Asocio pro ĝia decido sendi al mi pagon, sed tiun pagon mi akcepti ne povas."

13. El poŝtkarto de... al... : La artikolo "Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia" estas verkita ne de s-ro Beaufront, sed de mi (sed mi deziras, ke ĝi restu anonima). Kun plezuro mi donas al Vi plenan permeson represi ĝin kune kun rusa traduko en Via verko. Ankaŭ mi-an "Preĝon" mi kun plezuro permesas al Vi represi". (La poŝtkarto estas en la libro "Adolf Holzhaus, Zamenhof leteroj", n-ro 355.)


14. E. Privat en "Vivo de Zamenhof", 1920, p.92, rakontas: "Klientoj pagis nur kvardek kopejkojn - kelkaj eĉ nenion."

15. N.B. Havkin en la artikolo "Aleksander Silbernik" skribas: "La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage."

16. Kazimierz Tyminski ĉeestis la enterigon de nia Majstro. En artikolo "Ĉe la tombo" li skribas: "Malantaŭ la ĉerko formiĝis multnombra sekvantaro, kiu grandparte konsistis el popolamaso, loĝanta en la hebrea kvartalo; videble la onidiroj pri tio, ke la Majstro senpage kuracis kaj helpis malriĉulojn, estas pravaj." ("Pola Esperantisto", N-ro 2. Marto-aprilo 1956, p.2).

17. Anatolo Kofn en "Miaj memoroj pri d-ro Zamenhof" rakontas: "D-ro Zamenhof estis sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉaj malsanuloj." ("Nuntempa Bulgario". N-ro 12, Decembro 1958, p.22).

18. Emilian Loth en siaj "Rememoroj pri Zamenhof" skribas: "Zamenhof ne estis materialisto kaj kiel okulkuracisto li ofte kuracis malriĉulojn tute senpage." (Pola Esperantisto". N-ro 6. Novembro-Decembro 1959, p.4).



DE LA "NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA 1978
HUMPHREY TONKIN

...En mesaĝo al la usona nacia Esperanto-kongreso, Prezidento Jimmy Carter skribis: "Plibonigita komunikado inter individuoj kaj nacioj estas unu el la ĉefaj metodoj por konstrui pli grandan internacian interkomprenon kaj bonvolon. Mi laŭdas viajn klopodojn kontribui al tiu celo."

La usona ŝtatprezidento ne estis la sola nova favoranto de nia laboro: la revuo Soveta Unio aperigis, kelkajn monatojn antaŭe, longan favoran intervjuon pri Esperanto. Radio Vatikano komencis utiligi Esperanton. En Irano, senprecedente multaj civitanoj ekfrekventis Esperanto-kursojn.

La nunaj estas eksterordinaraj tagoj por Esperanto... Sed ni ne perdu nian ekvilibron...

Kaj kiel ni sukcesu? Unue, ni laboras por matura lingvo... profunda kaj fleksebla. Due, ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio. Trie, tiu Asocio estas finance kaj administrete solida, dank' al ŝparoj kaj plifortiĝoj de la pasintaj tri jaroj. Kvare, kaj ĉefe, ni laboras en mondo, kiu, kvankam ankoraŭ longe for de tiaj atingoj, tamen komencas kompreni la valoron (aŭ pli precize, la neceson) de harmonia kunvivado en spirito de reciproka komprenemo...



RAJTO DE KOMUNIKADO KAJ UNESKO

"Nenio pli bone helpas la interpopolan komprenigon, kiu estas unu el la fundamentaj celoj de UNESKO, ol la uzado de komuna lingvo." Tiel diris la ĝenerala direktoro de UNESKO A. M. M'Boŭ okaze de "tagoj de la franclingvanaro", (laŭ raporto de la franca ĵurnalo Le Figaro de 1977-02-17).

Laŭ plano de UNESKO por la jaroj 1977 kaj 1978, okazos sub ĝia organizado 232 konferencoj kaj kunvenoj, por kiuj UNESKO decidis elekti "laborajn lingvojn": anglan, araban, francan, hispanan, kaj rusan lingvojn.

Sed fakte la statistiko montras ke duono de la kunvenoj estas du-lingva: nome, angla kaj franca.


La anglalingvanoj kaj franclingvanoj en tiuj du-lingvaj kunvenoj evidente ĝuas grandan privilegion. Se ili ne konsideras tion privilegia, ili imagu sin estantaj en kunsido kun du aliaj lingvoj, ekz-e araba kaj ĉina, sen tradukistoj.

Ne nur en kunvenoj sed ankaŭ rilate al la eldonajtoj de UNESKO, la proporcio de la uzataj lingvoj estas simila.

Kio estas "rajto je komunikado" en UNESKO? Unu el la ĉefaj celoj de UNESKO estas plifortigi la respekton al homaj rajtoj sen lingva diskriminacio.

Dum kelko da lingvoj havas favoron, la interpopola kompreniĝo lamas sen ekvilibro inter la popoloj kun favorataj lingvoj k. popoloj kun nefavorataj lingvoj.

Ni substrekas la vortojn de la ĝenerala direktoro de UNESKO, cititajn komence kun espero, ke tiu agnosko iĝos fakta.



ĈE LA AKVOJ DE BABILONO
(PSALMO 137)

Fluas river' babilona, fluas de ni for.
Vento balancas kanojn, nin ŝancelas angor'.
Ĉe akvo ni sidas, nutras nin pano almoza,
Tero sankta, tero nia, patrujo grandioza!

Suno brilas kaj rivero flagras per fajrer'.
Tiujn brilojn ni rigardas, plenaj de sufer'.
En patrujo tiu suno leviĝas matene
Kaj orumas niajn montojn multe pli serene.

Sur salikoj longoharaj, inter verda skarp'
Pendas kordoj disŝiritaj de silenta harp'.
Harpoj niaj kun dek kordoj, harpoj de praavoj
Estu mutaj, estu surdaj en manoj de sklavo.

Ridetantaj homoj iras pro akvo al river'.
"Ho, harpistoj, malamikoj, ne sidu sur la ter'.
Ludu kune, kantu kune kaj ĉiun amuzu!"
"Ni ja sklavo, en malĝojo harpojn ni ne uzu".

Senhejmulo sian harpon ne prenas al man'.
Se la kordoj sur Vin falus kiel huragan',
Vi aŭskultus nin timeme kun la buŝo pala,
Kiel sonas kanto nia sur la ter' fatala!

Jerusalem', Jerusalem', malfeliĉa ter' !
Se ne estos mi por ĉiam Via brulofer',
Se mi Vin ne enbrakigos per bedaŭro mia,
Min malbenu kaj forgesu, Jerusalem' nia!

Kornel Ujejski
El la pola tradukis Irena Missiuro

RECENZO

FONDITA SUR ROKO

La filozofio de Spinoza post tri jarcentoj, de Albert Goodheir.

Glasgow: Eldonejo Kardo (16 Woodlands Drive, Coat-bridge, Skotlando) 1977. 37 p. Prezo: £ 1,35.

Novajo en la esperanta literaturo: libro pri filozofio aperis en la internacia lingvo. Tial ni bonvenigu tiun ĉi verkon, kiu klare kaj precize priskribas kaj prilumas la ĉefajn ideojn de Spinoza, kiu dediĉis sian tutan vivon al la serĉo de inda vivocelo kaj kiel alstrebi ĝin.

Laŭ Spinoza-konstatas la aŭtoro- certa scio estas scio pri la Tuto. Ĉio kio ekzistas estas unu Substanco, kiun oni povas nomi Dio aŭ Naturo.

Ĉiu fakto ekzistas pro aliaj faktoj. Floro ne ekzistas sen planto, planto ne sen siaj ĉirkaŭaĵoj: tero, aero kaj lumo, kaj ili ankaŭ ne estas memstaraj. Ĉio estas parto de ĉiomo; la tuto ekzistanta kaj la kaŭzo de ĉio ne estas aro da partoj.

Spinoza donis racian bazon al la kredo pri la unueco de la homaro, kaj de unuversio ĝenerale. Se la tuton de tio kio ekzistas oni nomas naturo, Dio estas Naturo.

Laŭ Spinoza la tuta universo estas unu estaĵo; ĉiu el ĝiaj partoj ekzistas kaj agas laŭ la leĝoj de tuto. Ne-niu parto povas agi arbitre.

Rigardante per la okulvitroj de la dudeka jarcento, oni povus diri ke ĉio estas reduktata al unueco nomita Energio, kiel pravas nun la Fiziko.

Laŭ Spinoza, la universo ne ekzistas por utili al homoj, do ne povas esti bona aŭ malbona. La vera bono por la homo estas tio, kio antaŭenigas lian strebadon al perfekte.

Bona estas ĉio kio helpas la homojn akiri perfektan homecon, kiu estas la unueco de la menso kun la tuta Naturo'.

Eminentaj homoj estas tiuj kiuj alstrebas celon eternan kaj komunan al ĉiuj homoj. Celante sian bonon, ili alstrebas la bonon de ĉiuj homoj. Laŭ Spinoza ĝojo estas ĉiam bona; oni neniam povas havi tro da ĝi.

La konkludo de Albert Goodheir estas ke Spinoza 'donis al la mondo ne nur la plej konvinkan el ĉiuj filozofiaj sistemoj, sed ankaŭ ekzemplan vivon de saĝulo, vivan manifestacion de la ideo de sia Etiko: 'Malamon oni ne venkas per malamo, sed per amo' (p.27).

Tre grave estas, kaj ni devas esti fieraj pro tio, ke verko pri filozofio de Spinoza kiu konvinkas la unuecon de

la homaro kaj de la universo générale, estas verkita en la internacia lingvo kiu simbolas tiun ĉi ideon.

La verko de Goodheir meritas do la interesiĝon de ĉiuj sinceraj esperantistoj.

Aleksander Manor




KIE DONIS MOSEO LA DEK ORDONOJN?

Antaŭ 3400 jaroj, la idoj de la dekdu filoj de Jakob kiuj estis sklavigitaj en Egiptio fuĝis sub la gvidado de la profeto Moseo tra la duoninsulo Sinajo al la promesita lando Kanaan. Laŭ la Biblio 400 000 judoj migris tra la dezerta duoninsulo en kondiĉoj tre malfavoraj por la homa vivo. Ĝis nun la migrado ne estas klarigita, kaj multaj rakontoj de la Biblio bezonas sciencan esploron.

Ben Gurion, la unua ĉefministro de Israelo, ne kredis ke 400 000 judoj povis kvardek jarojn migri tra la dezerto. Li asertis ke la nombro de la fuĝintoj estis nur 400. Neniu povas diri ĉu li pravis. Nuntempe arkeologoj provas klarigi tiun enigmon, sed post 3400 jaroj oni malfacile povas trovi postsignojn de la migrintaj judaj triboj, kiuj certe tiam ne havis eblecon konstrui urbojn, domojn aŭ fortikaĵojn.

Ne klara estas ankaŭ por ni ne nur la vojo tra kiu ili iris, sed ankaŭ ĝis nun ne estas klare de kiu monto Moseo revenis kun la ŝtonaj tabeloj por doni al sia popolo la dek ordonojn.

Estis priskribitaj tri vojoj kiujn la triboj uzis por atingi la landon Kanaan. La Kristana versio priskribas la sudan montaran vojon. La judoj iris laŭ ĝi ĉe la bordo de la Suezgolfo kaj forlasis ĝin enirante inter la montoj tra la valo Firan kie nun trovas sin la monaĥejo Santa Katarina. Tie devas esti la loko kie la judoj atendis Moseon ĝis kiam li revenos kun la tabelo kun la dek ordonoj. Laŭ tiu versio li ricevis ilin sur la Monto de Moseo proksime al la monaĥejo. La alteco de la montoj atingas en tiu regiono 2650 m. super la mara nivelo. Estas kritikantoj de tiu versio: La valo ne estas sufiĉe ampleksa por doni lokon por 400 000 homoj, kaj ankaŭ ne sufiĉas la akvo en tiu regiono por tia nombro da homoj. Aldone, kial la judoj elektis la vojon tra la malfacila granita altmontara regiono?



La versio de la beduenoj kiuj loĝas en Sinajo elektas alian monton kiel loko sur kiu Dio donis la tabelojn. Ĝi estas la monto Sirbal, kiu situas ĉe la valo Firan. La monto ne estas tiel alta, ĉar ĝi atingas nur 2200m.s.m.n., sed ĝi estas tre kruta kaj roka kaj aspektas pli impona ol la Monto de Moseo.

Ne ekzistas iuj ajn pruvoj ke tiu aŭ alia versio estas pli fidinda. En la sanktaj libroj de la judoj ne trovas sin iu ajn mencio kiu povas klarigi pli detale la problemon. La juda religio forjetis la esploron de tiu problemo, kiel ankaŭ ĝi forjetis la esploron pri kie trovas sin la tombo de Moseo. La kaŭzo de tiu sinteno estas ke la eltrovo de tiuj lokoj povus krei la paganan kutimon sanktigi lokojn aŭ homojn.

Laŭ la lastaj sekularaj esploroj oni pensas ke la judoj trapasis la dezerton ne per unu vojo, sed ĉiu grupeto de la migrantoj elektis alian vojon, versajne en la nemontara parto de Sinajo. Tie la plej alta monto estas nur 600 m. Tiu monteto estas tre kruta, kaj por homoj kiuj vivis en la egipta malaltaĵo ĝi faris impreson de montego.

Ankaŭ tiu versio versajne ne havas iujn ajn arkeologiajn aŭ historiajn pruvojn. La versioj de la Kristanoj kaj la beduenoj ankaŭ estas sen iu bazo, ĉar ili ankaŭ ekestis ĉ. 2000 jaroj post la eliro de la judoj el Egiptio. Do ankaŭ ili jam ne povis trovi postsignojn de tiu revolucia paŝo de sklavoj forjetantaj sian sklavecon.

M. Mašler




BIBLIAJ ENIGMOJ

- 1.- Kiu pereigis kvaronon de la tuta homaro?
Respondo: Kain.
- 2.- Kial la viĝo de Adam daŭris tiel longe?
Respondo: Ĉar li ne havis bopatrinon.
- 3.- Iu homo en paradizo vizitis ŝvitbanon, kie troviĝis multe da homoj, por renkonti Adamon, kiun li ne konis. Kiamaniere li ekkonis Adamon sen helpo de iu alia?
Resp.-Adam ne havis umbilikon.
- 4.- Kiam aŭdis ĉiuj homoj de la mondo la kokkriadon de la sama koko?
Resp.-En la arkeo de Noa.



5.- Noa enkondukis en la arkeon po unu paro el ĉiuj estaĵoj. Kiun specon li tamen ne enkondukis tien?
Resp.-La fiŝojn.

6.- **M u r p o r v i r o j!** 
Dio kreis la tutan mondon dirinte: estu lumo, estu firmaĵo, ... La akvo apartiĝu, la tero apartiĝu ktp. Li kreis simile la homon el polvo de la tero. Nur virinon Li kreis alimaniere. Li faligis profundan dormon sur la homon kaj kiam la homo ekdormis, Dio prenis, kvazaŭ elŝtelis, unu el liaj ripoj kaj konstruis el ĝi virinon. Kial la virino estis kreita alie ol ĉio?

Resp. de antifeministo: Dio kreis la virinon de kvazaŭ elŝtelita ripo por pruvi al la homaro, ke neniu bono devenas de ŝtelo.

(Rim.: Mi ne estas antifeministo).

kolektis: Z. Dimant

JELI - ANGULO

Ni perfektigu en Esperanto:

Esperanto - hebrea vortareto

(ankaŭ por plenaĝaj "eternaj komencantoj".)

akcipitro	נץ	kaperi	לחטוף (כסוס, ארניה)
brankardo	אלונקה	latrino	בית שימוש צבורי
cikatro	צלקה	miopa	קצר רואי
ĉiĉerono	מדריך חיירים	novico	מתחיל, טירון
delikto	עבריינות	oscedi	לפהק
etato	הקו	pneŭmatiko	צמיג
flikaĵo	טלאי	roso	סל
girlando	זר פרחים	skvamo	קשקשים
ĝiri	להסב(שיק וכן)	ŝutro	חרים
herezo	כפירה	tenajlo	צבת
ĥimero	דמיון שווא, תעמוט	upupo	דוכיפה
inkubo	סיוט	vakero	בוקר ("קאובוי")
jeto	מסוס סילון	zipo	רוכסן
ĵongli	לבצע להטוטים		



TURISMA ANGULO

JAFŬ - PASINTECO KAJ NUNTEMPO

Antaŭ jarmiloj la ŝipanoj, kiuj remis trans la bordo de la lando Israelo, estis vidantaj de malproksime belaspektan reliefan rokon; post sukcesa manovrado inter rokelstarajloj ili ĵetis la ankron proksime de la bordo kaj albordiĝis la belan urbon Jafo.

La alta klifo kaj la ŝtormaj ondoj inter la rifoj de la bordo vekis la miron de la maristoj kaj ilian fantazion. Pro tio ekestis diversaj legendoj pri la bordo en Jafo.

La antikva urbo Jafo situas ĉe la vojo, kiu kondukis de la egipta reĝlando en la sudo al la landoj de la nordo kaj oriento. La urbo estis menciata kelkfoje en antikvaj egiptaj epigrafoj. Laŭ unu el tiuj skribaĵoj ĝi estis konkerita ruzmaniere de la egipta reĝo Thothmes la 3-a (ĉ. 1500 a.K.). Li kaŝsendis en la urbon en korbegoj 200 homojn, kiuj poste malfermis ĝiajn pordegojn por la egiptaj armeanoj.

Post la okupo fare de la hebreaĵ triboj la urbo plifamiĝis, speciale en la epoko de la reĝo Salomono. Tiam ĝi servis kiel grava marhaveno. La Biblio rakontas pri tio plurloke. Speciale konata estas la rakonto pri la martransportado de la cedroj - konstrumaterialo por la Salomona Templo-el Libano, tra la haveno de Jafo.

La Helenoj kiuj okupis la lokon fortikigis ĝin, sed la Ĥaŝmonaidaj judaj reĝoj rekonkeris Jafon. Ili loĝigis tie multajn judojn kaj transformis ĝin en gravan havenurbon.

Dum la granda juda ribelo kontraŭ la romiaj regantoj Jafo estas detruita kaj multaj el la lokaj judoj estis mortigitaj.

Post la detruo de la II-a Templo ne ĉesis la loka juda ĉeesto. De tiam multaj ŝanĝoj kaj eventoj okazis en Jafo.

Dum la kristana regado la judoj tre suferis kaj devis forlasi ĝin. Ili revenis dum la araba okupo, sed pli poste la urbo estas detruita de ĝiaj regantoj.

De tiam -1345 - ĝis la 18-a j.c. la loko restis ruinita. Nur antaŭ 200 jaroj rekreskis tie denove loka loĝantaro.

Tio komenciĝis pro la alveno de ŝipoj por venigi kaj repreni la turistojn kaj pilgrimantojn, kiuj celis Jerusalemon. Tio altiris homojn, kiuj vendis manĝaĵojn al la venintoj aŭ luigis al ili rajdbestojn, kiuj veturigis ilin al Jerusalemo. Pro tio disvolviĝis la urbo kaj fariĝis la plej grava havenurbo en Israellando.

La juda komunumo en Jafo reestabliĝis en la komenco de la 19-a j.c. de novemigrintoj el Maroko. Kiam pligrandiĝis la enmigrado de la pioniroj en la fino de la jarcento, kreskis ankaŭ la nombro de judoj en Jafo. Novaj loĝkvartaloj estis konstruitaj kaj kiam la loĝdenseco estis en ili tro


granda kelkaj lokaj familioj fondis novan loĝlokon norde de Jafo. Tiamaniere fondiĝis la urbo Tel Aviv...

Antaŭ la milito por sendependeco kreskis multe la araba loĝantaro en Jafo. Dum la milito (1948) ili plejparte forlasis la urbon.

La disvolviĝo de Jafo en la lastaj 30 jaroj estis grandskala. Multaj novaj enmigrintoj ekloĝis tie. Oni detruis partojn de la antikva urbo kaj konstruis multajn novajn kvartalojn. La urbo estis unuigita kun la najbara urbo Tel Aviv, kies nuna oficiala nomo estas Tel-Aviv - Jafo.

Sur monteto apud la haveno estis malkovritaj gravaj restaĵoj el diversaj praepokoj ek de la 18-a j.c. a.K.! Tre proksime de tiu ĉi arkeologia loko troviĝas la antikva kvartalo de Jafo, kiu servas hodiaŭ kiel allogaĵo por turistoj, ĉefe dum la nokto. La tuta kvartalo estas restaŭrita arte; ĝi entenas artgaleriojn, juvelvendejojn, restoraciojn kaj noktoklubojn. Apude oni plantis belan parkon.

Jafo konsistas hodiaŭ el la nova kaj el la malnova urbo. Ĝia antikva haveno ne plu funkcias, sed al la fiŝkaptistaj ŝipetoj, kiuj preterpasas nokte la bordon, lumsignas ankoraŭ la malnova lumturo, avertanta ilin pri la ĉebordaj klifoj, la samaj klifoj pro kiuj kreiĝis la legendoj antaŭ miloj da jaroj.



Josef Šemer

Rabbi MOŜE EVEN-EZRA


Granado 1055 - 1135

Poeto kaj literatur-historiisto

EN TOMBAREJO (x)



Kuŝas sub tombaj ŝtonoj sen movo
Poreterne dormantoj. Sen povo
Malamegi, envii, paskvili;
Am' ne regas, nek klaĉ' inter ili.
Inter si ne povante babili,
Nek utili kaj nek malutili,
Ili devas kviete trankvili,
Ĉiu ajn al alia simili:
Kuŝi sen diferenc' inter sklavo
Kaj ties sinjora moŝt-gravo...

trad. J. Kohen-Cedek



(x) Laŭ kutimo de mezepokaj poetoj oni preferis, ke la tuta versaĵo, aŭ ĝia plej granda parto, estu samrima.

LANDO ISRAELO





Vortoj de Ŝ.Mizeruĥa

Tero votita, lakte-miela...
Ofte mi sonĝis Cin, Israelo.
Homoj bonkoraj, homoj fidelaj...
Tian mi vidas Cin, Israelo.

Havis popolo sorten krueLAN
Dum ĝi ekzistis sen Israelo.
Je la estonto kredas mi bela,
Cia estonto, land'-Israelo.

Maro senlima, blua ĉielo...
Amo eterna - land'-Israelo.
Lando biblia, lando fabela,
Mia espero - land'-Israelo.



**MALFERMITA LETERO AL LA PREZIDENTO A. SADAT KAJ
AL LA ĈEFMINISTRO M. BEGIN**

Tre estimataj Sinjoroj,

En tiu ĉi grava kaj epokfara momento, kiam ne nur la popoloj de nia regiono, sed la tuta homaro, direktas la okulojn al viaj noblaj pacpenadoj, mi prezentas al vi proponon por firmigi la pacon, kiun vi certe atingos.

La Prezidento A. Sadat prave asertis, dum la parolado en la israela Parlamento, ke sepdek procentoj da kaŭzoj de la Araba-Israela miskompreno estas psikologiaj. Bedaŭrinde, miskomprenoj daŭre ekzistas inter diversaj popoloj, inter homoj de la sama lando, eĉ inter anoj de la plej proksima familio aŭ inter bonaj amikoj. Tio estas neevitebla, ĉar la pensmanieroj de homoj estas ofte malsamaj. Sed por forigi la miskomprenojn, homoj kun bonaj intencoj interparoladas, diskutas pri siaj malsamaj opinioj, argumentadas kaj fine konvinkas unu la alian - kaj miskomprenoj forvaporigas. Tiu eventualeco ekzistas nur malofte inter Araboj kaj Israelanoj pro iliaj lingvodiferencoj. Ellerni hebrean, araban aŭ alian fremdan lingvon por esprimi siajn pensojn libere, oni nepre bezonas longajaran lacigan laboron. Tiu penado estas certe utila por akiri scion pri fremdaj kulturoj, sed ne estas atingebla por ĉiuj.

Por tiu celo ni devas uzi neŭtralan lingvon, kiun oni povus ellerni rapide por esprimi siajn pensojn precize kaj senpene. Tiu lingvo estas nur Esperanto, kiun oni povas rapide ellerni kaj atingi grandan konversacian sperton post aldonaj kelkaj monatoj.

Pro tio mi proponas al vi, estimataj Sinjoroj, kaj mi petas vin, ke vi persvadu kaj fervorigu ĉiujn infanojn kaj plenaĝulojn en viaj landoj ellerni tiun lingvon kaj uzi ĝin por interparoladoj kun fremdlandanoj. La uzado de tiu facile ellernebla lingvo disrompos la barojn inter niaj popoloj, ĉesigos la daŭrigon de la miskomprenoj inter ĉiuj homoj kaj donos impulson al noblaj homaspiroj.

Nia regiono estas naskiĝloko de grandaj religioj; nun ĝi radiu la ĉefan konstruon al la paco inter la homa gento, la internacian lingvon Esperanto. La uzado de tiu lingvo helpos treege la plenumon de viaj noblaj devizoj; Neniam plu da militoj! Neniam plu da sangdisverŝo!

Kun sento de profunda estimo

Inĝ. Z. Dimant




15.

KRUCVORTENIGMO No. 2



1	2	3	4	5	6	7	8
9					10		
11					12		
13					14		15
16			17		18		
		19		20			
21	22		23			24	25
	26	27					28
29					30		
31					32		33
34				35			
36				37			38
		39					

N^o 27




N^o 30

HORIZONTALE: 1. La fondinto de la oficiala organo de UEA. 9. Ne havanta propran movon. 10. Grasa fluajo uzata por nutrado, medicino, industrio ktp. 11. Rifuĝa establejo, kie oni zorgas knabinojn, kies gepatroj mortis. 13. Aro da kantistoj 14. Guto elfluanta el la okuloj. 16. Plata, senreliefa. 18. Internacia organizo de esperantistaj instruistoj. 19. El ĝi oni ekstraktas petrolon. 21. Sufikso. 23. Prefikse. 24. Sufikso. 26. Gardejo por dokumentoj. 28. Participo pasiva. 29. Naŭ dividite per dudeksep. 30. Prepozicio kiu signifas disdividon. 31. Malĝoja, sen kapo. 32. Tropika fruktarbo. 34. Persona nedefinita pronomo (inverse). 35. Parto de la interna fundo de la okulo. 36. Kulturebla kampo. 37. Prepozicio montranta lokon, tempon aŭ staton. 38. Franca monero. 39. Dupersona biciklo.

VERTIKALE: 1. Nomo de scienco. 2. (Inverse). Insulo en sudorienta Azio. 3. Reĉantaĵo. 4. La nombro de la literoj en No. 13, horizontale. 5. La deka, la dudek-kvina kaj la dekoka (el 28). 6. Aganta konforme al la leĝoj de honoro kaj fideleco. 7. konjunkcio. 8. Nevoptera insekto el tropikaj landoj, vivanta socie kiel la formikoj. 12. Plej bona parto el aro. 15. Prefikse montranta ripeton. 17. Kaŭzo per ia drogo de nenatura dormo. 20. Fabela ina estaĵo kun supernatura povo. 22. En ĝi formiĝas la homa voĉo. 23. La nacia movado de la juda popolo. 27. Objekto kapabla repreni la antaŭan formon post kiam ĝi estas fleksita. 29. Geologia formacio de la sekundara epoko. 30. Fritile. 32. Postuli liveron de ia poste pagota komercaĵo. 33. Elkreskaĵo ĉe la ekstremo de niaj fingroj (inverse). 35. Duobla interna korporgano.

La solvoj aperas sur la paĝo 18.



ROTARIO KAJ ESPERANTO

Antaŭ kelkaj monatoj s-ano D-ro Maŝler ricevis inviton, prelegi pri Esperanto en la Rotaria Klubo de la urbo Holon. Fiam li kontaktiĝis kun s-ano Norman Williams de Denton, Anglio, de kiu li ricevis informojn utilajn pri la Rotaria movado kaj Esperanto.

Jen kelkaj interesaj faktoj: Antaŭ la dua mondmilito ekzistis "Rotario-Amikaro" de Esperantistoj, sed ĝin pereigis Hitler dum la milito. Ĉirkaŭ la jaro 1959 fondiĝis de s-ano Williams mem la nuna RADE - Rotaria Asocio de Esperantistoj. Rotario kaj Esperanto havas komunajn celojn: internacia interkomprenigo kaj mondpaco.

La angla estas la oficiala lingvo (la usona dialekto!) sed oni interlaboras en deksep lingvoj. Kiam Rotario fondiĝis, en 1905, ĉiu membro estis angle parolanta. Hodiaŭ nur ĉ. 40% parolas angle. Pro la fakto ke Rotario pli kaj pli disvastiĝis en Azio ĉi-tiu procento ĉiujare pli malkreskas.

Kvankam oni uzas deksep lingvojn, oni tradukas ĉiujn dokumentojn nur en kvaronon de ili. La kosto de la lingvo-problemo ĉe la Rotarianoj estas almenaŭ unu dolaro por membro jare, kaj estas 800 000 membroj en la mondo!

EL NIA MOVADO KAJ AGADO

ZAMENHOF FESTO EN TEL AVIVO

La 15-an de decembro okazis en la Tel-Aviva klubejo (en Bejt Jad Levanim) la tradicia solena Zamenhof festo. Malgraŭ la pluva tago ĉeestis ĝin 100 samideanoj kaj kur-sanoj, kiuj venis de diversaj landpartoj. Ili aŭdis prelegojn pri la Majstro kaj lia kreitaĵo en la Internacia kaj hebrea lingvoj kaj ĝuis varian artan parton. La programo estis bone prizorgita de la sindona s-anino Vunderbaum, kiu dum multaj jaroj konstante aranĝas ĉiujn solenaĵojn de ELI.

Kiel freŝiga kontribuado por la vespero estis la loterio, zorgeme aranĝita de s-anino Ester Haroun, en kiu la plej bonŝancaj ĉeestantoj gajnis belajn premiojn.

KURSOJ de ESPERANTO EN ISRAELO



La nombro de la lernantoj de nia lingvo ege pligrandiĝis ĉi jare. Al la kursoj de d-ro H. Maŝler kaj s-ano J. Murĵan anoncis sin tre multaj kandidatoj. Pro tio oni devis dividi ilin en kvar apartajn kursojn, kiuj okazas en du lokoj: "Junulara Centro" (3) kaj "Bejt Jad -Levanim" (1), ambaŭ en Tel Avivo.

Anoncita en la lasta numero de nia revuo, la kurso en la tel aviva "Popola Universitato" estas nun aldona atingado por nia Movado. Ankaŭ ĝi estas tutplena malgraŭ ĝia sufiĉe alta kosto. Eble pro tio la lernantoj de tiu ĉi kurso pli diligente lernas kaj preskaŭ neniam forestas. La kurson gvidas d-ro Maŝler.

En mezlernejo Kugel, Holon, en la 10-a kaj 11-a klasoj daŭras la kurso de s-ano A. Ron. Partoprenas ĝin kelkdeko da lernantoj, kiuj lernas E. kiel devigan studfakon, inkl. notojn en la fino de la jaro. La instruisto raportas pri granda intereso pri E. flanke de la geknaboj. La Internacia Lingvo estas instruata ankaŭ en Kfar Saba. S-ano J. Giladi gvidas tie 2 kursojn - unu en popollernejo kaj la duan en internulejo por speciale kapablaj lernantoj.

Nova kurso en tel aviva "Junulara Centro" komenciĝos en Februaro. Pri kandidatoj bonvolu sciigi d-ron Maŝler - Tel Aviv, str. Hapardes 11. (tel 240-459.)

21 lernantoj studas Esperanton en Matanja en la kurso, kiun gvidas s-anino D. Šor. Pri la kurso antaŭanncis aŭdiŝoj pendigitaj en la stratoj de la urbo.

La koresponda kurso ĉiam daŭras. Gvidas ĝin s-anoj J. Šemer, C. Levenkopf, D. Mager, A. Zajdman, G. Zeevi kaj J. Meiri. Adreso: p.k. 22041, Tel Aviv.

En la lasta momento: s-ano J. Giladi sciigis nin, ke li komencis du kursojn en la mezlernejo en Kfar Saba. Lernas lernantoj de la klaso 10-a kaj 11-a.

NOVA KULTURESTRO

S-ano Robert Alberg bonvole akceptis la taskon de respondeculo pri la kulturprogramoj dum la ĉiuĵaŭdaj kunvenoj de la Tel Aviva klubejo.

Ni deziras al li plenan sukceson en lia agado.

ELI

KOTIZOJ DE UEA (Universala Esperanto-Asocio) POR 1978

MA (Individua Membro-Abonanto: ricevas la revuon "Esperanto" kaj la Jarlibron):	275 IL.
MJ (Individua Membro kun Jarlibro):	110 IL.
SA (Simpla abono de "Esperanto" sen membreco de UEA):	165 IL.
K-to (Abono de "Kontakto", la revuo de TEJO)	85 IL.

rimarko: Individua membro (MA aŭ MJ) de UEA malpli ol 26-jara estas aŭtomate membro ankaŭ de la junulara sekcio TEJO kaj ricevas senpage la revuon "Kontakto".

Kotizperanto: Reuven Berlinerblau, str. Aĥad -Haam 134, Tel Avivo. tel. 233 859.

Subtenu la tutmondan Movadon! Fariĝu membro de Universala Esperanto-Asocio!

Solvoj de krucvortenigmo N^o 2. (paĝo 15).

Hrizontale: 1. berthelot, 9. inert-, 10. ole-, 11. orfinej-, 13. ĥor-, 14. larm-, 16. eben-, 18. ilei, 19. naft-, 21. il-, 23. re-, 24. ec-, 26. arkiv-, 28. it-, 29. trion-, 30. po, 31. rist-, 32. maag-, 34. ino, 35. retin-, 36. agr-, 37. en, 38. su, 39. tandem-.

Vertikale: 1. bioĥemi-, 2. -enrob, 3. refren-, 4. tri, 5. htn, 6. lojal-, 7. ol, 8. termit-, 12. elit-, 15. re-, 17. narkot-, 20. fein-, 22. laring-, 25. cionism-, 27. risort-, 29. trias-, 30. pat-, 32. mend-, 33. gnu, 35. ren-.

GRANDANIMA KONTRIBUAĴO DE FORPASINTA SAMIDEANO

S-ano Bernard Svarĵenski -estu benita Lia memoro-el Herclija (forpasinta la 27-an de aŭgusto 1977; vidu nian lastan numeron) postlasis al Esperanto-Ligo en Israelo grandan sumon kiel heredaĵon.

Tiu ĉi testamento fare de nia meritoplena veterano estu simbolo imitinda por niaj membroj kaj adeptoj.

Ni memorigas al niaj legantoj, ke d-ro Mašler ankaŭ testamentis antaŭ kelkaj jaroj grandan parton de sia havaĵo al ELI kaj UEA por eluzi la monon al diversaj kampaĵoj celantaj disvastigi Esperanton en nia lando.

GRATULOJ

Al la pligrandigita familio ZEEVI (Farkaŝ) - korajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj Sigal kaj Gabi kaj al la ĉarmaj novnaskitaj ĝemelinaj - deziras

ELI kaj JELI

RENKONTIĜO DE D-ro MAŠLER KUN LA PREZIDANTO DE UEA D-ro H. TONKIN KAJ LIA EDZINO.

Dum sia vojaĝo tra USONO renkontiĝis d-ro Mašler kun ges-anoj Tonkin en lia laborloko, universitato de Filadelfio. Dum tre afabla kaj kora akcepto d-ro M. ricevis klarigojn pri ĉiuj problemoj, kiuj iam restis ne ĝis la fino klarigitaj.

La interesa renkontiĝo daŭris preskaŭ du horojn. Post tre vigla interparolo ili disiĝis kun sento de amikeco, kiu daŭras inter ELI kaj UEA.

VOLAS KORESPONDI

Leo Trumm, 26-jara, bakisto, studento de pedagogio: pri vojaĝoj, bakado kaj ĝardenkulturado. Urtseestr. 92, D-5372 Schleiden-Gemünd, F.R. Germanio.

58-jara Svedo, s-ro Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, 431 31 Mölndal, Svedio - pri literaturo, arto kaj ŝako.

s-ro J. A. Hippe, Van Meelstraat 82, Beverwijk, Nederland, edziĝinta - pri politiko, sindikatmovado, abstinenco kaj humanismo.

LISTO DE ESPERANTAJOJ
aĉetebraj en la Tel-Aviva klubejo




1. Lernolibro hebr.-esp., L. Turno- H. Mašler	15. IL
2. Lernolibro hebr.-esp., D. Šor	15. IL
3. Vortaro hebr.- esp., J. Murjan	18. IL
4. Lernol. hebr. kaj jida- esp., Gureviĉ	4. IL
5. Necenzurita Humoro, H. Mašler	4. IL
6. N.B. Havkin (Biografio), J. Kohen Cedek	2. IL
7. Bildkartoj (kun esp. klarigoj).	0.30 IL
8. Propagandkartoj (hebrelingvaj).	0.50 IL
9. Esp. glumarkoj (kvadrataj) po	0.25 IL
10. Esp. glumarkoj (rondaj) po	0.125 IL



ABONTARIFOJ KAJ JARKOTIZOJ DE SAT (1978)

Jarkotizo (SAT kun Sennaciulo)	195,00 IL
Sennaciulo (aperas monate)	104,00 "
Sennacieca Revuo (Aperas 1 fojon jare)	39,00 "

//
Heroldo de Esperanto
(aerpoŝte: aldone)

	180,70 "
	74,00 "
	112,00 "

Horizonto

rimarko: La prezoj inkludas veloraldonan imposton.

Monon bonvolu sendi al J. Ben Alter, p.k. 379, Petañ Tikva.



JARKOTIZO

Ni afable petas ĉiujn membrojn de ELI plenumi ilian samideanan devon, pagante la jarkotizon por la jaro 1978. (per aldonita ĉeko). La kotizo estas 50 IL.

Koran antaŭdankon
ELI



DONACO

S-ano Kurt Lindström de Svedio (Vällingby) sendis al nia biblioteko libron de Theodor Herzl "La Juda Ŝtato". Oni ne devas substreki, kian valoron havas por ni tiu libro, pri kiu oni multe aŭdas sed malofte havas eblecon legi. La libro estis eldonita en la jaro 1934 de "Literatura Mondo" en Budapeŝto. Tradukis: B. Selzer.